Drezen, Lanti kaj La Nova Epoko

La proksimiĝo de la sovetia Esperanto-movado al SAT

Ulrich LINS

Tiu ĉi artikolo celas ĵeti iom da lumo sur la plej fruan historion de la rilatoj inter SAT kaj la Esperanto-movado en Soveta Ruslando. Estas konate, ke sovetiaj esperantistoj multe kontribuis al la disfloro de SAT en la dudekaj jaroj, ĝis okazis en 1930/31 skismo en la laborista Esperanto-movado, kiun kelkajn jarojn poste sekvis la silentiĝo de Esperanto en Soveta Unio. La artikolo, kiu baziĝas sur materialoj el la arkivo de SAT plejparte ĝis nun tute nekonataj, limigas sin al la komencaj jaroj de la kunlaboro de sovetiaj esperantistoj en SAT, sed celas ĝuste per tiu koncentriĝo ankaŭ akrigi la konscion pri la ĝenerala historia signifo, kiun –malgraŭ sia tragika fiasko– konservas tiu kunlaboro.

La Oktobra Revolucio en Ruslando kaj la fino de la Unua Mondmilito estis cezuraj eventoj ankaŭ por la laborista Esperanto-movado. Ili forte antaŭenigis la klopodojn de Eŭgeno Lanti kaj aliaj ne nur definitivigi la apartiĝon disde la neŭtrala movado, sed ankaŭ fine starigi tutmondan asocion de la laboristaj esperantistoj. La tuta Eŭropo kaptiĝis de revolucia entuziasmo, tiel ke ŝajnis anakronisme, se la laboristaj esperantistoj plue permesus al si agi nur en nacia skalo. Ĉar laŭ inspiro de la rusa modelo ĉie kreskis la atendo je tutmonda revolucio de la proletaro, la laborista Esperanto-movado sentis sia devo kiel eble plej baldaŭ starigi efikan organizaĵon de esperantistaj apogantoj de tiu revolucio –nelaste pro tio, ke multaj imagis, ke ju pli disvastiĝos la revolucio, des pli kreskos ankaŭ la ŝancoj de Esperanto servi kiel komunikilo en la nova, postrevolucia mondordo.

Komence de aŭgusto 1921 la celo estis atingita. Interalie sekve de la prepa-

raj artikoloj de Lanti, poste kunigitaj en la broŝuro "For la neŭtralismon!" dum la 13a Universala Kongreso en Praha estis fondita Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), unuiĝo kun individua, "sennacieca" organizformo, kiu proponis sin kiel komunan hejmon de ĉiuspecaj maldekstruloj uzantaj Esperanton, de socialistoj, komunistoj kaj anarkiistoj.

Unuaj paŝoj post la revolucio

En Praha ne ĉeestis iu rusa esperantisto. La fondo de SAT do okazis sen rekta kontribuo flanke de la Esperanto-movado en Soveta Ruslando. Tio tamen surprizas nur unuavide. La kialo estas simpla: Tiutempe la sovetia movado okupiĝis ĉefe pri sia propra transvivado. Disvastigi Esperanton sub la kondiĉoj de postrevolucia rekonstruo, civita milito kaj interveno de ekstertandaj potencoj estis tasko, kies prizorgo ŝajnas eĉ aŭdaca, kiam oni konsciigas al si la enormajn problemojn, kun kiuj luktadis la juna soveta ŝtato. Ĝis 1917 diversgrade prematajn de la cara regimo, la rusaj esperantistoj bezonis kelkajn jarojn por adapti sin al la nova situacio kaj utiligi ŝancojn, kiujn ankaŭ al ili malfermis la revolucio. Lige kun la strebo de la ŝtato levi la kulturan nivelon de la amasoj, en la jaroj 1919/20 en diversaj lokoj la esperantistoj sukcesis organiziĝi kiel sekcioj de la t.n. politklerigaj fakoj, kiuj troviĝis sub kontrolo de la Popola Komisarejo pri Klerigo. Tio signifis por la esperantistoj valoran financan subtenon. Ekzemple, en februaro 1921, laŭ kroniko de la Esperanto-Klubo en Niĵnij-Novgorod, la Gubernia Politkleriga Administracio "donis al ĝi nelimigitan krediton kaj ĉiuspecan helpon; ankaŭ al ĉiuj (10) aktivaj laborantoj de la Klubo, salajron kaj militan nutronormon"[1]. Same, la gvidantoj de Esperanto kursoj estis salajrataj.

Aliflanke, sufiĉe multaj pli malnovaj esperantistoj rifuzis ligi Esperanton al oficialaj sovetiaj institucioj, tiel ke la lokaj politklerigaj fakoj ofte devis plende konstati la mankon de instruantoj de Esperanto. La kunlaboremaj esperantistoj siavice plendis, ke ne eblas plene eluzi la "bonegan kampon", kiun Esperanto havas en Soveta Ruslando[2]. Sed pri tio, kiom bonaj vere estis la kondiĉoj, venis kontraŭdiraj sciigoj. Komence de 1920 en eksterlando disvastiĝis informoj, kiuj asertis la devigan enkondukon de Esperanto en lernejoj laŭ decido de oficiala komisiono elektita de la sovetrusa registaro. Post kelkmonata necerteco montriĝis, ke la informo estas falsa; la registaro neniam faris decidon favore al Esperanto. Temis fakte nur pri rekomendo farita de nepotenca komisiono, kies signifon rusaj esperantistoj fanfarone troigis. Entute okazis "multaj nepripensitaj agoj" de lokaj esperantistoj, kiuj ofte kompromitis Esperanton ĉe partiaj rondoj aŭ sovetiaj institucioj. Ernest Drezen, kiu poste iĝis la gvidanto de la sovetia Esperanto-movado, tial avertis jam en oktobro 1920 pri "esperantista emo ĉion grandiozigi"[3].

---

1 "Ruĝa Esperantisto" (Presorgano de N.-Novgoroda Klubo de S.E.U.), 1921, n-ro 1 (oktobro), p. 8

2 N. Karatajev, "Letero el Kronstadt" (5-4-1921) – "Esperantista Laboristo" (Paris), vol. 2, 1921, n-ro 7/8, p. 12. –Tiu ĉi letero raportis ankaŭ pri la bojkotado de malnovaj esperantistoj al la laboro por Esperanto kadre de sovetiaj institucioj.

3 E. Drezen, "La sperto de la lastaj ruslandaj Esperanto-eksperimentoj", – "Esperantista Movado" (Monata organo de

La fondo de SEU

La eniron en novan etapon markis la Tria Tutrustanda Esperantista Kongreso, kiu okazis komence de junio 1921 en Petrograd. Partoprenis ĝin 163 delegitoj, el kiuj 34 estis komunistoj, 10 socialistoj, 2 anarkiistoj kaj 117 senpartiuloj[4]. Laŭ la malmultaj fontoj ŝajnas, ke la kongresanoj arde diskutis pri la direkto prenota de la movado en Soveta Ruslando. Okazis fortaj kunpuŝiĝoj, malpli inter maldekstruloj kaj neŭtralistoj (ĉi-lastaj verŝajne preferis bojkoti la kongreson), ol inter diverstendencaj revoluciuloj mem. La jam menciita Drezen estis ellaborinta tezarojn, kiuj akcentis la bezonon de forta centra organizo kaj implicite alvokis ĉiujn esperantistojn, ankaŭ la "neŭtralulojn", al kunlaboro por rekonstruo de la movado. Kontraŭ tiuj tezaroj plej forte oponis Natan Futerfas, la prezidanto de organiza komitato de Tutruslanda Esperantista Federacio [OKTEF]. Li deklaris unuaranga tasko la fortigon de la lokaj grupoj, konsiderante la tempon nematura por la kreo de tutlanda unuiĝo. Kaj centrigitan organizon Futerfas trovis eĉ pli malŝatinda, se ĝi montras sin kompremisema rilate la neŭtralistojn[5].

Sed venkis Drezen, kiu emfazis la neceson de organiza unueco post preskaŭ kvarjara malordo kaj dissplititeco. Malplimulto vane batalis kontraŭ tio, kion ĝi nomis "kruda kaj severa unuformigo de la movado"; Futerfas kaj dudeko da samideanoj proteste forlasis la kongreson[6]. La restintaj delegitoj voĉdonis por la propono, ke estu fondita Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU), kaj elektis Centran Komitaton (CK), kies prezidanto iĝis Drezen[7].

La fondo de SEU apartenis al la komenca fazo de nova potitik-ekonomia celdifino de la soveta ŝtato. Por restarigi la rusan ekonomion, kiun pro la civita milito kaj la tro rapidaj socialismigaj provoj minacis kolapso, Lenin en marto 1921 estis proklaminta sian t.n. Novan Ekonomian Potitikon (NEP). Ties ĉefa celo estis radikala sanigo de la ekonomio –eĉ je la kostoj de konsekvenca observo de komunismaj principoj. NEP, kiu permesis denove privatajn entreprenojn kaj preskaŭ liberan komercon, por multaj komunistoj tial estis ŝoko kaj dolora detruo de iluzioj. La komunistaj idealistoj pli kaj pli devis cedi lokon al komunistaj burokratoj: administrantoj kaj komercistoj iĝis por la Partio pli gravaj, ol revoluciuloj, utopiistoj kaj oratoroj. NEP signifis ankaŭ adiaŭon al kuraĝaj foje aŭdacaj kulturrevoluciaj eksperimentoj. Post la Oktobra Revolucio multe prosperis la proletkultura movado, kies adeptoj prokla-

---

Kronstadta Esperantista Societo), 1920, n-ro 2 (9), oktobro-novembro, p…
- Simile ankaŭ: H.K., "Kial Esperanto en Ruslando malvenkas", – "Sennacieca Revuo", vol. 3, 1921-22, n-ro 10 (julio 1922). p. 7.

4 "Esperantista Laboristo", vol. 2, 1921, n-ro 7/8, p. 14.

5 N. Futerfas, "La neprokrasteblaj taskoj", – "Esperantista Movado", 1921, n-ro 3 (13), marto, p. 2.

6 Laŭ "Enciklopedio de Esperanto", p. 591, estis 20 personoj, kiuj forlasis la kongreson. Laŭ ruslingvaj memoroj de Drezen publikigitaj en 1932, estis Futerfas kun 12 kunuloj: "V bor'be za SESR" (En batalo por SEU), – "Meĵdunarodnyj jazyk" (Internacia Lingvo), vol. 10, 1932, n-ro 4, p. 107.

7 La menciitaj tezaroj de Drezen kaj oficiala raporto pri la fondkongreso de SEU troviĝas en "Esperanta Informilo" (Monata organo de Petrograda Societo Esperantista Unio), 1921, n-ro 2/6 (junio/oktobro) – La Esperanta nomo de SEU poste estis: Sovetrespublikara Esperantista Unio. Membroj de la unua CK, kies nomoj iĝis konataj, estis, krom Drezen, Vasilij Devjatnin (jam pli frue konata), Sergej Obruĉev, Nikolaj Modenov kaj (kiel kandidato) S.N. Podkaminer.

mis la protetaron portanto de tute nova kulturo, radikale diferenca de la antaŭa, burĝa kulturo. Lenin, kontraŭe, pragmate celis unuavice forigi la analfabetecon kaj levi la ĝeneralan klerecnivelon de la popolo, al kiu li deziris proksimigi la tradician kulturan heredaĵon, eĉ se burĝan, anstataŭ konfuzi ĝin per eksperimentoj pri revolucia arto kaj literaturo. Ekde 1921 la proletkultura movado submetiĝis al kreskanta kontrolo fare de la Partio kaj fine perdis la restaĵojn de sia aglibereco.

Nemirige, ankaŭ la Esperanto-movado spertis la sekvojn de evoluo, dum kiu la premaj realaĵoj diktis subordigon de revolucia entuziasmo. Fine de 1921 oficiala komuniko publikigita en "Izvestija" kaj "Trud" postulis, ke dissolviĝu la Esperanto-sekcioj ĉe lokaj politklerigaj fakoj[8]. SEU do eklaboris en tempo, kiam pro NEP ĉesis la financa subteno al Esperanta agado. Sed Drezen estis frutempe kompreninta, ke necesos adapti sin al novaj cirkonstancoj. Li mem laboris en la ŝtata aparato kaj sciis juĝi prioritatojn. Pli rapide ol aliaj li vidis, ke la nova direkto malfermas ŝancojn, kiujn ankaŭ la Esperanto-movado povos eluzi. Ekzemple, li konsciis, ke NEP legitimis la provon altiri al SEU tiujn burĝajn esperantistojn, kiuj por la bono de Esperanto pretis kunlabori en la nova organizaĵo proklamanta lojalecon al la soveta reĝimo.

Drezen serĉas kontakton

Ŝajnas, ke SEU, fondita du monatojn pli frue, ne sendis saluton al la fondkongreso de SAT; la protokolo ne notas ricevon de mesaĝo. Tio estas indikaĵo, kiom SEU estis absorbita de internaj organizaj aferoj. Ne eblis multe pensi pri la internaciaj kontaktoj. Eĉ la tute ordinaraj poŝtaj ritatoj inter Soveta Ruslando kaj la cetera mondo nur de kelkaj monatoj estis restarigitaj. En januaro 1921 la Klubo en Niĵnij Novgorod ĝoje registris la unuafojan ricevon de leteroj kaj Esperanto-gazetoj el eksterlando[9].

Aliflanke, estus kontraŭnature, se al la rusaj esperantistoj mankus internacia rigardo. Kaj efektive estis jam unu provo konformigi tiun internacian rigardon kun la novaj kondiĉoj kreitaj post la Oktobra Revolucio. En 1919 en Samara estis fondita "Esperanta Sekcio de la IIIa Komunista Internacio" (ESKI), kiu fiksis la celon propagandi Esperanton kiel rimedon por la venkigo de komunismo. La iniciatintoj de ESKI estis Oĥitoviĉ (alinome Ort Sunnam), Sergej Hajdovskij (pseŭdonime Peĉenego) kaj Drezen. Fine de 1920 ESKI translokiĝis al Moskvo, kie ĝi tamen devis ŝanĝi sian nomon al "Esperantista Komunista Internacio", post instruiĝo pri tio, ke Komintern permesas nur naciajn sekciojn. Dum la menciita Tria Tutruslanda Kongreso ESKI decidis sendi salut-mesaĝon al la fondkongreso de SAT (kiu, laŭ propono de Lanti, respondis per danka telegramo). En septembro 1921 aperis eĉ propra bulteno de ESKI. Sed nelonge poste, laŭ postulo de la Partio, ESKI devis dissolvi sin. Fiaskis do la provo aparte organizi la komunistojn-esperantistojn –provo, pri kiu pli malfrue Drezen evitis mencii, ke li mem ĝin kuninicia-

8 Traduko en "Sennacieca Revuo", vol.3, 1921/22, n-ro 5 (febr. 1922), p. 9

9 “Ruĝa Esperantisto”, 1921, n-ro 1, p. 8.

tis. Tamen, jam antaŭ ol decidiĝis la sorto de ESKI, la fondo de SAT disponigis tutmondan organizaĵon, kiu celis ligi al si ankaŭ la komunistajn esperantistojn. Sekve, la ekzisto de SAT necese trovis la atenton de SEU, speciale de ĝia prezidanto Drezen.

Jam la 1an de aŭgusto 1921 (la tagon, en kiu komenciĝis la fondkongreso de SAT) Drezen estis skribinta leteron al Lanti, la unuan, kiun li sendis al sia posta ĉefa antagonisto. La letero ne multe traktas pri organizaj demandoj, sed koncentras sin al personaj aferoj. Drezen informas al Lanti, ke li "kun granda plezuro" legis liajn artikolojn en "Esperantista Laboristo", deziras starigi "pli intiman interrilaton kun vi" kaj pretas kontribui per artikoloj. Por prezenti sin Drezen donas kelkajn detalojn pri sia esperantista aktivado, interalie la preparlaboroj por historio de la projektoj de internacia lingvo, kaj pri sia partopreno en la revolucio. Tuŝante la situacion de la rusa movado, Drezen skribas ne pli ol tion ĉi:

"Ni laboras en tre malfacila medio. La stato ekonomia de la lando, ĉiaspeca manko kaj mankego konsumas ĉiujn niajn fortojn."

La letero de Drezen al Lanti estis tre afabla, preskaŭ kora. Lanti respondis, laŭ manskriba noto, la 11an de septembro 1921 –kion, ni ne scias. Sed nelonge poste en la gazeto "Sub la Ruĝan Standardon!" aperis kontribuaĵo de Lanti ("Letero el Blanka Francio"), kiu esprimis sin plene solidara al la rusaj revoluciaj esperantistoj:

"Esperanto forigu la lingvan diferencon inter la popoloj; komunismo forigu la klasan diferencon inter homoj! Rusaj fratoj, eksciu ke ĉi-tie en blanka Francio troviĝas multaj esperantistoj, kiuj tutkore simpatias vian liberigan movadon. Ili scias kiom grandaj estas viaj suferoj, kiom krima estas la agado de sia [la franca] registaro, kiom sindona estas via heroeco. Vi montras al ni la vojon. Daŭrigu, ni sekvos!"[10].

La kontaktoj de rusaj esperantistoj kun SAT estis dum la unua jaro de ĝia ekzisto ankoraŭ minimumaj; la unua Jarlibro de SAT (1922) registris nur ses membrojn en Soveta Ruslando. Sed la rilatoj pli rapide ligiĝis sekve de la ekscitiĝo, kiun kaŭzis onidiroj, ke Komintern faris decidon pri la demando de internacia helpa lingvo kaj rekomendis anstataŭ Esperanto Idon. Iu Studa Komisiono pretendanta agi laŭ la komisio de Komintern fakte estis veninta al tia konkludo. Ĉar okcidentaj komunistaj gazetoj, interalie "L'Humanite", raportis pri la decido, Lanti kompreneble deziris scii, ĉu ĝin vere apogas Komintern, kaj tiucele turnis sin al SEU. Post iom da atendado fine venis de SEU la sciigo, ke temas pri intrigo de idistoj kaj ke la Studa Komisiono estas jam likvidita.

Lanti en Moskvo

Por esti tamen tute certa kaj rekte informiĝi ĉe Komintern, Lanti decidis fa-

10 "Sub la Ruĝan Standardon! Gazeto de rusaj laboristoj-esperantistoj", 1921, n-ro 1 (novembro), p. 5. - Tiu ĉi revueto post la fino de ESKI anstataŭis ties organon "Eskiano" (septembro 1921); de ambaŭ nur po unu numero.

ri vojaĝon al Moskvo. Tie li ricevis konfirmon, ke Komintern dissolvis la komisionon. "kiu fakte neniam funkciis", kaj ke entute la Internacio "havis neniian intereson por tiu entrepreno". Aparte de tiu rezulto, la trisemajna vojaĝo estis por Lanti interesega, multrilate rivela sperto. Kvankam valorus resumi la impresojn, kiujn notis Lanti pri la ĝeneralaj kondiĉoj en Ruslando –ili profunde skuis lian kredon al la komunisma idealo–, ni tamen tie ĉi limigos nin al priskribo de lia konatiĝo kun la movado kaj ĝiaj gvidantoj[11].

Lanti restadis en Moskvo en aŭgusto 1922. Lia vizito okazis en aparte interesa tempo, ĉar personoj, kiuj estis kontraŭstarintaj al Drezen en 1921, ĵus havigis al si tribunon. Nome, ili fondis en junio 1922 "La Nova Epoko", kiu subtitole nomis sin "Internacia literatur-socia revuo". La unua numero indikis kunlaborantojn, el kiuj kelkaj poste iĝis bone konataj: Georgij Deŝkin, Evgenij Mihxal'skij, Sergej Obruĉev. En enkonduka ĉefartikolo la revuo kontrastigis la du tendarojn, kiuj, laŭ ĝi, ekzistis en la Esperanto-movado:

“La unua grupigas la fortojn de la malnova putrinta foriranta mondo. Tie kolektiĝas diversaj ekleziaj, naciemaj, policaj, idee-komercaj, marĉandemaj, hipokrite-neŭtralaj elementoj, kiuj sub la masko de apolitikeco kaj neŭtralismo defendas praktike per ĉiu vorto kaj per prisilentigo mem la ordon regantan, kies spiritaj idoj ili estas. Esperanto servas al ilia ŝovinismo.

Cxe alia fronto grupiĝas kaj unuiĝas ĉiuj ribelaj fortoj, plensukaj, freŝaj, aktivaj, prematej kaj persekutataj de la malnova sociordo. Sennaciuloj, kontraŭmilitistoj, laboristoj, revolucianoj laŭtigas sian voĉon kaj strecas sian volon al konstruo de nova socio, nova Epoko”.

Kvankam iĝis klare, al kiu tendaro deziris aparteni la nova revuo, el la deklaro oni ne povas konkludi, kio konsistigis la disput-punktojn kun SEU. Sed Lanti dum siaj interparoloj kun la agantoj de "La Nova Epoko" detale informiĝis pri ilia starpunkto. (Li facile trovis ilin, ĉar la redaktejo troviĝis en la strato Tverskaja, proksime de la legendeca Hotelo “Lux”, en kiu li loĝis).

Konvenas unue prezenti la homojn, kiuj gvidis "La Nova Epoko" kaj renkontiĝis kun Lanti:

- Grigorij Demidjuk, nask. 1895, lernis Esperanton en 1909 kaj estis edukita por la profesio de min-inĝeniero. Dum la vizito de Lanti li ankoraŭ okupis altan postenon en la Ruĝa Armeo, en kiuj li batalis (ĝis 1921) kontraŭ la eksterlandaj invadintoj. Pli malfrue, dum pli ol jardeko, li estis unu el la gvidantoj de SEU. La jarojn 1937 ĝis 1955 li devis pasigi en labortendaroj kaj koncentrejoj. Reliberiĝinte, li denove vivis en Moskvo, kie li mortis en novembro 1985[12].
- Natan Futerfas: Pri lia vivo ne multo estas konata. Li kredebte estis proksimume samaĝa kiel Nekrasov, kun kiu li kunlaboris en la klopodo

11 La vojaĝraporto "Tri semajnojn en Rusio", el kiu ni citas la eldirojn de Lanti pri Drezen kaj “la Nova Epoko”, aperis serie en “Sennacieca Revuo” de novembro 1922 ĝis julio 1923; ĝi estas republikigita en la broŝuro “El verkoj de E. Lanti”, vol. 2, Laroque Timbaut 1982, p. 3 - 65.

12 Vidu la raporton de Detlev Blanke, "Renkontiĝo kun Grigorij Demidjuk". – “Der Esperantist”, vol. 20, 1984, n-ro 123, p. 5-6; samnumere, p. 6-7, kaj en n-ro 132(1985), p. 82, troviĝas impona listo de la verkoj de Demidjuk.

starigi Tutruslandan Esperantistan Federacion. Lanti kaj aliaj aparte notis pri li grandan oratoran talenton.

- Nikolaj Nekrasov, nask. 1900, lernis Esperanton en 1915. Laŭprofesie ĵurnalisto, li en 1918/1919 estis prezidanto de Tutruslanda Ligo de Junaj Esperantistoj, poste sekretario de la organiza komitato de Tutruslanda Esperantista Federacio. En "La Nova Epoko" li havis la funkcion de redakcia sekretario. Ankaŭ li iĝis elstarulo en la sovetia movado, sed diference de Demidjuk, kiu aktivis pli sur organiza kampo, ĉefe dediĉis sin al literatura agado. Li tradukis multajn rusajn poetojn (i.a. "Eŭgeno Onegin" de Puŝkin) kaj ankaŭ verkis originalajn poemojn kaj studojn pri la Esperanta literaturo. Li iĝis viktimo de la Granda Purigo sub Stalin kaj laŭdire pereis en 1939 en punlaborejo en Siberio.
- Valentin Poljakov: Pri li, kies nomo en Esperantaj tekstoj aperis en la formo Polakov, preskaŭ tute mankas biografiaj informoj. En la SAT-Jarlibro 1923 li indikis la profesion "bibliotekisto-pedagogo". Li kunfondis kaj prezidis la rusan sekcion de Esperantista Literatura Asocio, kiu celis instigi al tradukado el la rusa literaturo. Li verkis poemojn, kiuj –kune kun tiuj de Miĥal'skij– aperis en la broŝuro "La unua ondo" (1918). Ŝajnas, ke post 1925 li ne plu aktivis en la movado.

Tiu kvaropo donis al Lanti "plej afablan kaj bonkamaradecan akcepton". Li trovis, ke neniu el ili estas partiano, sed ke ĉiuj simpatias kun la komunismo. Pri Futerfas Lanti aldonis, ke li estas anarkiisto kaj dum iom da tempo, pro falsa denunco, estis malliberigita. (Lanti ŝajne ne renkontis Sergej Hajdovskij, jam menciitan lige kun ESKI, kiu same apartenis al la redakcianoj de "La Nova Epoko"; ankaŭ li estis anarkiisto).

"Anarkiista" SAT, "burĝa" SEU

Jam en la posta tago Lanti havis okazon konatiĝi ankaŭ kun Drezen[13]. Nekrasov akompanis lin al Kremlo, kie troviĝis la laborejo de Drezen, kiu okupis altan postenon en la ŝtata administracio, nome tiun de vicdirektoro de Tutruslanda Centra Plenumkomitato de Sovetoj. Ankaŭ ĉe la prezidanto de SEU Lanti trovis sin tre afable akceptita. Drezen invitis lin al sia hejmo kaj tie fiere montris al la gasto sian bibliotekon. Lanti konstatis, "kiom ame li [Drezen] parolas pri nia afero" bedaŭrante nur, ke pro sia ofico li estas tro okupita por fari pli por Esperanto. Tamen, inter la du ne regis plena harmonio de opinioj. Tio montriĝis ĉe la temo de kunlaboro kun SAT. Lanti notis: "Drezen riproĉas, ke SAT ne estas pure komunista. Li ne volas kunlabori kun anarkiistoj kaj social-demokratoj". Kaj li daŭrigas, kvazaŭ rebate: "Sed, strange, li estas prezidanto de "Sovetlanda Esperanta Unuiĝo", en kiu estas ne nur anarkiistoj sed burĝoj el plej certa speco".

Tiuj frazoj tre skize, sed ne maltrafe lumigas la kontraŭajn poziciojn. Dre-

13 Mankas ĝis nun kontentiga provo de biografio de Drezen. Provizore oni devas kontentiĝi per la priskriboj en E. Borsboom, “Vivo de Lanti”, Parizo, 1976, kaj en la nova eldono de “La Dangera Lingvo”.

zen, proksima al la politike decidaj organoj, esprimis fortan skeptikon kontraŭ internacia organizaĵo, restanta ekster la influsfero de Komintern. Dume, kion Lanti notis kiel kontraŭdiron al tiu pozicio, baziĝis sur la informoj kaj interpretoj donitaj al li de la "Novepokuloj". Ili komprenis sin revolucia avangardo de la Esperanto-movado, tute dediĉita al la uzo de la lingvo por antaŭenigo de la revolucio, kaj sekve malaprobis la pragmatan starpunkton de Drezen, kiu konforme al NEP orientiĝis laŭ la aktualaj kondiĉoj en Ruslando kaj opiniis por SEU nemalhavebla ankaŭ la kunlaboron de pli malnovaj esperantistoj. Kion Drezen kredis bezoni por entute organize stabiligi la movadon, tion la homoj de "La Nova Epoko" malŝate konsideris kompromisemo kun "neŭtraluloj" kaj kroĉiĝo al la malnova nura propagando de Esperanto.

Ne estas dubo, ke Lanti dum sia restado en Moskvo esprimis apogon al la starpunkto de "La Nova Epoko", ĉar ĝi tute kongruis kun lia propra devizo "For la neŭtralismon!". En sia vojaĝraporto li rekomendis, ke la rusaj esperantistoj "devas nepre forlasi la malnovan, neŭtralisman propagandsistemon", mokante pri tio, ke en la Moskva Klubo Esperantista estas ekspoziciita ne revolucia Esperanto-gazeto, sed la neŭtrala "Esperanto Triumfonta". Estas ankaŭ ekster dubo, ke Lanti profunde impresis la "Novepokulojn". Ĉar ilin precipe fascinis la revoluciaj trajtoj de sennaciismo, Lanti ankoraŭ en Moskvo verkis manuskripton pri tiu idearo. Ĝi aperis en numero 3 –kun enkonduka noto, en kiu la redakcio konstatis, ke la diskutoj kun Lanti "kvazaŭ cementis la idean parencecon kaj proksimecon de SAT kaj de 'La Nova Epoko' ". La komencita persona kontakto transdaŭris la viziton de Lanti. Demidjuk kaj Nekrasov vigle korespondis kun li kaj poste ankaŭ regule revidis lin en SAT-kongresoj. Evoluis ligoj, kiujn karakterizis krom "idea parenceco" fortaj sentoj de persona simpatio. "Viaj leteroj ĉiam faras al ni la tagon de l' ricevo festa tago", –skribis Demidjuk al Lanti la 8an de majo 1923. Jam tiutempe li atestis, ke "ni lernis ĉe vi forigi la neŭtralismon" (letero de 12-1-1923), kaj tute similaj vortoj troviĝas en la verŝajne lasta letero, kiun Lanti ricevis de sia rusa amiko: Kun dato de la 2a de aŭgusto 1930 lin atingis en la Londona Kongreso, kiun SEU bojkotis, de Demidjuk la konfirmo: "... ĉe vi mi lernis batali".

La "sorĉpova Kremlulo"

Jam dum la restado de Lanti en Moskvo la latenta konflikto de "La Nova Epoko" kun Drezen ektuŝis la limon al eksplodo. En la dua, aŭgusta numero de la revuo aperis recenzo, kiu forte ekscitis Drezen. Temis pri kritiko kontraŭ lia ĵus aperinta ruslingva broŝuro "La problemo de lingvo internacia. Provo de materiisma surbazigo de la problemo". En tiu recenzo, kies aŭtoro estis Futerfas, oni legis interalie la jenon:

“Per siaj argumentoj la aŭtoro faris malbonan servon al marksanoj, kies vidpunkton ritate al artefarita lingvo li pretendis... pruvi. Li montris per siaj ekzemploj, ke lingvo ne estas nur sekvo, rezulto de mastrum-historiaj kondiĉoj, sed ke ĝi siavice influas la medion aŭ ĉiuokaze ili ambaŭ reciproke

efikas; sekve li pruvis inverson de la pruvendo. Ni ne scias, ĉu la marksanoj lin dankos por tia servo, sed por ni estas sunklare, ke la konsekvenca historia materalismo neniel sukcesos pravigi artefaritan lingvon".

Futerfas prave atentigis pri tio, ke en la marksisma teorio artefarita lingvo ne havas lokon. Aliflanke, estis legitima provo de Drezen batali por agnoskata pozicio de Esperanto en Soveta Ruslando kaj tiucele aserti ĝian akordiĝon kun marksismo. Finfine multaj penis apogi sin sur tiun aŭtoritaton. La kolero de Drezen do estis komprenebla. Reage, li skribis refutan leteron kaj postulis de la redakcio ĝian aperigon.

Lanti vidis tiun leteron de Drezen, dum li estis en Moskvo. Pri la pluaj sekvoj de la letero, "pri kiu ni ĉiuj multe ridis", la redakcio informis lin la 2an de oktobro. Tiuj sekvoj estis ne plu amuzaj: Numero 3 aperis kun prokrasto; eksiĝis portempe el SEU la Moskva Klubo; kaj la konflikto inter Drezen/SEU kaj "La Nova Epoko" pli kaj pli entiris la demandon de la sinteno al SAT. Ni klopodu ĉi-sekve pli detale montri la disvolviĝon de tiu konflikto, ĉefe baziĝante sur eldiroj de Drezen kaj Lanti kaj sur leteroj ĝis nun neniam publikigitaj, kiujn inter 1922 kaj 1925 sendis Demidjuk kaj Nekrasov al Lanti[14].

Kiam Drezen konstatis, ke la redakcio ne volas publikigi lian leteron senŝanĝe (ĝi pretis aperigi nur parton), li uzis siajn oficajn rilatojn kaj turnis sin al la Literatura Ĉefadministracio, verŝajne dezirante apliki per ĝi premon al la "La Nova Epoko" aŭ almenaŭ informiĝi pri eblaj paŝoj cele al plena aperigo de la letero. Ne estas tute klare, ĝis kiu grado Drezen aludis pri anarkiismaj tendencoj de iuj redakcianoj. Tia aludo certe promesis efikon: Kvankam la anarkiisma movado en Ruslando estis jam subpremita en 1921, la reĝimo plue timis la pledon de la anarkiistoj por uzo de la spontanea kreemo de la amasoj aŭ entute la voĉojn de ĉiuj, kiuj de maldekstra pozicio kritikis la postrevolucian evoluon, kontraŭstarigante al la diktaturo de bolŝevikoj la "purecon" de la origina ideo pri sovetoj. Sed eĉ se Drezen ne denuncis la "Novepokulojn" kiel anarkiistojn, la cenzurejo sekve de lia elpaŝo eksuspektis pri ĝenerale neortodoksa enhavo de "La Nova Epoko". Ĝi forstrekis 10 el 24 paĝoj jam kompostitaj de numero 3.

Kiam la redakcianoj eksciis pri la situacio, ili la vesperon de la sama tago iris al la ejo de la Moskva Klubo. Tie ili kolektive verkis, parodie al rusa kanto, baladon kiun ili kantis ĥore kaj kies tekston ili poste skribis en la publike alireblan klublibron. Kelkaj partoj de tiu "Kanto pri sorĉpova Kremlulo" estas citindaj:

"Jen kiel intencas sorĉpova Kremlul'
Revenĝi al "Nova Epoko"
Kaj tutan eldonon per tondro k brul'
Ekstermi po peco k floko,

Ĉar tiu ne estas SEU-a fili'

14 Ne konserviĝis laŭ nia scio, la leteroj, kiujn Lanti skribis al Demidjuk kaj Nekrasov en 1922/23. Li mem ŝajne komencis fari kopiojn de siaj leteroj nur meze de 1924.

Kaj presi kuraĝis recenzon pri li.

Pli laŭte do muzik'!
Trumpetu venkon,
Venkita malamik'
Kaj kuras for, for, for.
Do por CKSEU
Kaj por Bulteno
Hura - hurau laŭte ĥor'!

....

"Ho Moŝto Cenzura, avertas mi vin
Pri jena malbona afero,
Ke oni kuraĝis recenzi mem min
En la "Nov-Epoka" numero.

Atentu, ke mia refutoleter'
Neprege aperu en tria numer'."[15].

La "Novepokuloj" do en la formo de sarkasma satiro provis konsoli sin, kolere konstatinte la malfacilaĵojn, kiujn Drezen kaŭzis al ili per sia interveno ĉe la cenzurejo. Surprize por ili, Drezen (kiu en la balado "gaje veturas en aŭtomobil'") tre rapide reagis –laŭ la letero al Lanti de 2-10-1922:

“Jam sekvintan tagon, ektiminte la rezultojn neatenditajn de sia ago kaj perdon de sia reputacio, k-do Drezen mem alkuris (piede!) kaj tutan horon atendis ĝis ni venis.

... Ho kiom afabla kaj kompromisema li estis! Kompreneble "li estis tute prava" kaj "ni kulpis", kvankam "eble" eĉ li ankaŭ estis "iom" kulpa! Sed "pro amo al Esperanto" oni devas nepre kunagordi la penojn”.

Poste , en longa letero al Lanti de 12-1-1923, Demidjuk pli detale rakontis pri la traktadoj kun Drezen. Oni interkonsentis, ke la redakcio publikigu la leteron de Drezen kaj ke tiu klopodu ĉe la Literatura Ĉefadministracio pri plirapidigo de la pres-permeso kaj pri nuligo de la forstrekoj. La numero fine aperis, sed Drezen ne atingis, ke estu permesita la plena teksto. Verŝajne tial la redakcio ne plu vidis sin ligita al la promeso publikigi la leteron de Drezen. Anstataŭe ĝi aperigis artikolon de Adam Jodko, kiu responde al Futerfas "solvis" la demandon, ĉu Esperanto kaj marksismo estas akordigeblaj, per la deklaro:

“Simile al telegrafo, telefono, aeroplano k.a. teknikiloj, Esp-o ne bezonas marksisman pravigon aŭ surbazigon”[16].

Drezen proponis dum la traktadoj ankaŭ, ke "La Nova Epoko" metu sur sin la ŝildon de SEU, kaj kompense proponis subvencion, kiu sekurigu la ekziston de la revuo. Futerfas vidis en tio provon de subaĉeto. Kiam la redakcianoj kontraŭargumentis, ke ilia gazeto havas internacian karakteron, dum SEU es-

15 La plena teksto de la balado, kiun plejparte verkis Nekrasov, aperis en “Sennaciulo”, n-ro 316 (23-10-1930), p. 29.
16 A. Jodko. "Esperanto de l’marksisma vidpunkto" – “La Nova Epoko”, 1922, n-ro 4 (decembro), kol. 16).

tas nacia organizaĵo celanta unuavice al propagando, Drezen montris sin tiupunkte komprenema.

Eksiĝo de la Moskva Klubo

La konflikto tamen intertempe alprenis pli grandajn dimensiojn, ĉar la 12an de oktobro [1922] kvar komitatanoj, membroj de SAT, deklaris sian eksiĝon el la Moskva Klubo, kiu estis filio de SEU[17]. Ili per tio protestis interalie kontraŭ deklaro farita de Drezen, laŭ kiu "en sia taktiko CK penas eviti politikon kaj tendencas al simpla Esperanta informoficejo en Sovetlandaj kondiĉoj". En ĝenerala kunveno de la Klubo, kie devis elektiĝi novaj komitatanoj, Demidjuk, unu el la eksiĝintoj, anoncis, ke li volas kunlabori nur en organizaĵo, "kiu difinas klare sian klasan proletarian konsiston kaj idearon". Tion la aliaj ĉeestantoj prenis kiel signalon por ĝenerala atako kontraŭ la "burĝeca kaj burokrata fizionomio" de SEU. Neatendite por Demidjuk, la komunistaj membroj proponis, ke la tuta Klubo apartiĝu de SEU. Tiu propono estis akceptita per plimulto.

Drezen rifuzis agnoski la juran validon de la decido pri eksiĝo de la Klubo el SEU. En deklaro nome de la CK li komunikis:

“Senrespondecaj elementoj, epaŝintaj dum la kongreso de 1921 j. sub la standardo de "federalistoj"-kontraŭuloj de apliko de sovetismaj principoj en esp/a movado, provis sub la formo de kritiko kontraŭ apartaj personoj –kompromiti la tutan ideon de SEU-ekzisto”.

Aparte notinde estas, ke Drezen kulpigis la opoziciulojn eluzi siajn ligojn kun SAT:

“Kelkiuj el tiu ĉi grupo, surmetinte al si oportunan por ili vestaĵon de "sennaciecaj revoluciuloj" (S.A.T.) –provas disigi rusian esp/an movadon, seninginte ĝin de ĉia centro kaj evidente metante ĝin en plenan dependon de la eksterlandaj esp/istaj organizaĵoj”.

Responde, la novaj komitatanoj de la Moskva Klubo ellaboris ampleksan komunikon, direktitan al la Prezidantaro de la CK de SEU. En tiu ili atentigis, ke la Klubo "neniel sukcesis propagandi la lingvon inter proletararo", kaj atribuis tion al la fakto, ke oni bazis la movadon sur neŭtralismaj principoj. Tute konforme al la fondiĝa filozofio de SAT, la Klubo deklaris porlingvan kunlaboron kun burĝoj danĝera por la proletaro, ĉar la neŭtralismo nebuligas la klaskonscion. La CK estis informita, ke la Klubo pretas komenci traktadon pri kunlaboro,"kondiĉe ke C.K. oficiale kaj malnebule deklaros, ke ĝi definitive forlasas ĝis nun praktikitajn neŭtralismajn principojn, eksigas el si ĉiujn neŭtral-burĝajn elementojn". El entute sep kondiĉoj la unuaj du estis:

1. SEU devas kategorie forĵeti la nebulan formulon de "Soveta platformo"
2. SEU devas sin bazi sur maldekstrumaj revoluciaj proletaraj elementoj kaj blokiĝi kun SAT-anoj, Novepokuloj kaj ceteraj kaj rompi ĉiujn ligojn

17 La kvar komitatanoj estis, krom Demidjuk, tre verŝajne Futerfas, Nekrasov kaj aŭ Poljakov aŭ Hajdovskij.

kun "verde-flavaj esp/istoj".

Fine, la Klubo minacis, ke, se la kondiĉoj ne estos plenumitaj, ĝi malkaŝos ("por refuti la fuŝinformojn de SEU") al oficialaj institucioj de la Respubliko "la veran fizionomion de nuna C.K. SEU".

Drezen splitas la opozicion

La radikalan postularon de la klubaj komitatanoj sekvis unue trankvilo. Dum kelkaj semajnoj la Klubo faris pozitivan kaj konstruan laboron kaj "evitis iajn novajn atakojn" kontraŭ SEU, kiel skribis Demidjuk. "Vidante tion k-do Drezen komencis novan vojon": Li individue kontaktis la komitatanojn de la Klubo unu post la alia, konfesis erarojn de la CK de SEU kaj proponis al ili eniron en la CK. Tio estis ruza taktiko, pri kiu la "Novepokuloj" longe diskutis. Demidjuk kaj Poljakov emis akcepti la inviton, opiniante ke nur tiam estos ŝanco transformi SEU en vere komunistan organizaĵon. Futerfas kaj Nekrasov estis kontraŭ, ĉar laŭ ilia opinio "eniro malfortigus nian redakcian kaj eldonejan aferon, same nian SAT-laboron". Hajdovskij havis mezan pozicion.

Fine, Demidjuk, Futerfas, Nekrasov kaj Hajdovskij atingis unuecon, farante la jenan decidon:

"... reteni sin tute de la eniro al C.K. SEU, laŭeble konvinkigi pri tio la komunistan frakcion, sed se tiu lasta decidos tamen eniri al C.K. –ĉiuforte subteni ĝin en batalo kontraŭ neŭtralismo de SEU".

Tamen, la lastajn kunsidojn antaŭ tiu ĉi decido Poljakov ne partoprenis. Kiam ĝi estis farita, montriĝis, ke li ne aprobis ĝin. Kaŝe jam interkonsentinte kun Drezen pri eniro en la CK, li komencis rekte persvadi la komunistan frakcion, t.e. la komunistajn membrojn de la kluba komitato, eniri la Centran Komitaton. La aliaj atentigis Poljakov, ke li rompis la internan grupan solidarecon. Tiam li deklaris sian eksiĝon el "La Nova Epoko". Demidjuk komentis, ke "Drezen gajnis, uzante malnovan reĝan regulon –disigi kaj regi". SEU ricevis (15 -12 - 1922) novan C.K. en kiun eniris krom Poljakov ankaŭ Jodko kaj Boris Breslau, anoj de la komunista frakcio. Drezen restis prezidanto de la CK. Krome, nova ĝenerala kunveno de la Moskva Klubo decidis restarigi la ligojn kun SEU.

Demidjuk skribis en sia letero de 12-1-1923, ke la Klubo "reakiris sian neŭtralistan karakteron, nun ĝin regas filistra, etburĝa atmosfero".

Sed pri la CK li konfesis, ke ĝi "ŝajne jam komencas labori pli vigle, penante rektigi sian politikan linion kaj eliri el verda neŭtralista marĉo". Kvankam, laŭ Demidjuk, restis ĉe ĝi "la malnova trajto ĝia – senlima burokratismo", li ne povis nei, ke la CK havas fortan pozicion, senpage ricevante paperon por siaj eldonaĵoj kaj ankaŭ ne devante pagi por la hejtado de sia ejo. Tre efike estis, ke Drezen atingis deklaron de la Popola Komisarejo pri Internaj Aferoj malpermesantan la formiĝon de Esperanto-kluboj ekster la kadro de SEU.

Ne nur tio: Drezen tiustadie ankaŭ jam pripensis kiel submeti al sia influo

la tutmondan movadon. Li ja estis spertinta, kioman minacon povas prezenti la sinapogo de la opozicio je SAT. La CK oficiale anoncis, ke ĝi decidis subteni la aniĝon de sovetaj esperantistoj en SAT, kaj proponis la starigon de sekretarejo ĉe SEU, kies celo estu, kiel diris Poljakov al Demidjuk, "kontroli kaj statistiki la aliĝon al SAT". La motivoj de Drezen estis evidentaj: Li deziris nun siaflanke apogi sin je SAT por forpuŝi la kvazaŭan monopolon de "La Nova Epoko" pri internaciaj rilatoj. "Drezen malkaŝe diras", informis Demidjuk en poŝtkarto de 22-1-1923, "ke li ne povas akcepti la bazon de SAT kaj ĝian ideologion, sed konsideras SAT movadon dume necesa por vigligi kaj freŝigi la movadon ĝenerale kaj ĉar mankas alia revolucia esp.a organizaĵo".

Demidjuk konfidis al Lanti, ke ĝuste ĉar por li kaj liaj amikoj "SAT estas idee la plej kara organizaĵo esperantista", ili ne volas, ke la varbadon por SAT prizorgu SEU. Tio estu la tasko de "La Nova Epoko". Li daŭrigis:

"Nun, kiam kreskas la aroganteco de la burĝaro, eĉ en medio esperantista,... kiam kapitalistaro tutmonda per okupado de Essen, nesto de komunista Germanio, kaj per enkarcerigo de franciaj komunistoj celas subpremi per sia Bismarkoza boto la proletararon, nun ankaŭ ni devas plifortigi nian atakon kontraŭ la esperantista burĝaro, ĉesigi ĝian falsadon kaj kompromitadon de esperanto, de ĝia movado. Kaj ne burokrataj rimedoj estas necesaj por tiu atako!"

La Nova Epoko malfortiĝas

Kun tiu ĉi batalema retoriko atentinde kontrastis la informoj, kiujn donis Demidjuk samletere pri la malfortiĝinta pozicio de "La Nova Epoko". La siatempa interveno de Drezen ĉe la Literatura Ĉefadministracio pluefikis, ĉar tiu oficejo nun severe cenzuris la enhavon de la revuo. En la kvara kajero ne povis aperi ĉefartikolo, kiu klopodis pravigi la edukon al sennaciismo (anstataŭ internaciismo kompromitita per la milito kaj la Dua Internacio), nek kontribuaĵo de A. Bogdanov, la fondinto de la proletkultura movado[18]. Ankaŭ de la antaŭparolo al Esperanta traduko de la fama poemo "Dekdu" de Aleksandr Blok –broŝuro, kiun eldonis "La Nova Epoko"– la cenzuro forstrekis du trionojn.

Je la fino de la longa letero, kiun Demidjuk skribis malfrue en la nokto, lacigita kaj maltrankvila pro danĝera operacio de sia edzino, troviĝis la jenaj emociaj vortoj direktitaj al Lanti:

"Mi ne havas kuraĝon peti ĉe vi kelkajn liniojn, sed ili estus eliksiro viviga por mi. Via ĉeesto en Moskvo, niaj interparoloj multe influis min kaj helpis al mi pli firme stariĝi ĉe nia komuna vojo al estonto, al klara kaj hela idealo de vera fratamo".

Kelkajn semajnojn poste Lanti ricevis ankaŭ novan vivsignon de Nekrasov. La letero portas la daton de la 1a marto. En sia bela manskribo Nekrasov scii-

18 Poste, en la literature-scienca aldono al "Sennacieca Revuo", februaro kaj marto 1924, aperis ("verkita speciale por nia revuo") artikolo de A. Bogdanov, "De la filozofio al la organiza scienco".

gis, ke la movado en Moskvo multe vigliĝis. Li raportis, ke post la foriro de Poljakov la redakcianoj decidis lasi SEU labori trankvile. La antaŭan konfuzon ŝajne sekvis ia kunekzistado. Sed restis, kiel konfirmis Nekrasov, nepacigebla konflikto inter la agantoj de "La Nova Epoko" kaj la novaj SAT-anoj ĉirkaŭ Poljakov, kiuj aktivis en SEU.

Nekrasov skribis, ke Poljakov lerte prezentas la situacion kiel antagonismon inter anarkiistoj kaj komunistoj. Kvankam "tio ne estas tute ĝusta", Poljakov "trovis nian 'Aĥilan kalkanon'". La malfortiĝo de “La Nova Epoko” ŝuldiĝis, laŭ Nekrasov, al tio, ke ĝi neniam konsekvence faris organizan laboron kaj kontentiĝis pri la aparteno al tutmonda asocio, lasante tiamaniere al SEU la kampon por konstrui movadon en Soveta Ruslando. Li daŭrigis:

“Se vi aldonos al tio personajn karakterizojn de nia triopo: Futerfas –brila kaj talenta oratoro kaj kritikisto, ne kompromisema ekstremulo. Demidjuk — bona administranto, certe organizkapabla, sed ĉiam preferanta konkretan simplan laboron, mi kiu pli kaj pli inklinas ermitiĝi for de la aktiva movado esp-ista kaj okupiĝi sole pri serioza literatura Esp. laboro; —por vi do estos tute klare, ke ne ni zorgos pri la larĝa organizo de la movado ĉi-tiea”.

Nekrasov tamen ne plendis pri malvenko de "La Nova Epoko", sed male atribuis al ĝia agado efikon je la nuna SEU:

”La atakitoj kaj mokitoj ekvigliĝis, Drezen fariĝis ekstreme aktiva kaj preskaŭ ĉiutage nun vizitas la klubon... Polakov en la neenviinda rolo de "perfidulo" ekpenis sin pravigi. Oni devas diri, ke li multon faris por ŝanĝi la relvojon antaŭan de SEU... Nun SEU preparas per oferema laborado de Polakov belajn eldonaĵojn politikajn baldaŭ aperontajn, kiuj sendube levos ĝiajn akciojn”.

.....

Nun pri Drezen persone!... ne timu, ke li perfidos al Esperanto. Ĝenerale tute ne estas necese lin forŝovi. Diablo lin prenu, li laboru: kvankam pro sia egoismo li faris kelkajn malutilojn al Esperanto kaj eĉ flatis al Ido por eventuale ne trafi lastan lokon, lia laboro povas esti utila. Li povas multon sufiĉe profitigan por Esperanto fari tre lerte”.

Estis do objektiva priskribo de la situacio, kion Nekrasov liveris. Li ankaŭ ne faris al si iluziojn pri la karaktero de la rilatoj de SEU kun SAT. Li avertis Lanti, ke SEU elpaŝos kiel konkuranto de SAT en la tutmonda skalo ("ĉar post eble nelonga tempo la tuta mondo estos Sovetlanda") kaj precipe turnos sin kontraŭ la “individualista kaj idealista” karaktero de SAT, per kio ĝi, laŭ Nekrasov, tute pravas: "Persone mi serioze dubas, ke SAT sukcesos plene sin adapti al la komunistaj principoj (ekz. la organiza principo de SAT klare evidentigas anarkiisman tipon)". Nekrasov atendis, ke inter la sennaciismo, kiu estas neharmoniigebla kun "la t.n. materialisma diatektiko", kaj ĝiaj kontraŭuloj estos "sufiĉe varma lukto". Sed: "Ĉiuokaze rezultos nur utilo por Esperanto".

SEU difinas sian rilaton al SAT

Ankoraŭ en la sama monato, marto 1923, aperis difino de la starpunkto de SEU pri SAT. Nekrasov estis jam anoncinta ĝin al Lanti, kiel respondon al iu letero de SAT al Drezen, senditan verŝajne en decembro. Sub la titoto “Nia pozicio (Deklaracia letero al ĉiuj revoluciaj esperantistaj organizaĵoj)” la CK distribuis kvarpaĝan presitan tekston en 2000 ekzempleroj.

La deklaro elradiis memfidon de SEU post la sukcesa "batalo kontraŭ anarĥiaj kaj detruaj elementoj". SEU asertis pri si, ke ĝi "estas nek nacia, nek nacilingva organizaĵo", sed ampleksas ĉiujn landojn, kie "la komunistoj starigos la sistemon de Soveta regado”, do supozeble "post kelka tempo" ankaŭ Polladon, Germanion, Ĉinion ktp. Aliflanke SEU koncedis, ke ĝi "subtenas SAT kiel solan dume internacian organizaĵon de la revoluciaj Esperantistoj" — en kio ni povas malkovri la penan provon de SEU akomodi sin al la linio de Komintern, kies Kvara Kongreso en novembro 1922 estis konfirminta, ke komunistoj kunlaboru kun socialistoj en unueca fronto de la laborista klaso kontraŭ la burĝaro kaj faŝismo. Tiu kondiĉa apogo al SAT estis volvita en amason da tre kritikaj eldiroj, ekzemple riproĉoj pro la distingo inter por- kaj peresperanta agado, la neligiteco de sennaciismo al ekonomia revolucio aŭ la provo de SAT-anoj apliki la kriterion de neŭtralismo ankaŭ al la kondiĉoj en Soveta Ruslando. Sekvis la jena konkludo:

”SEU alvokas ĉiulandajn komunistojn-esperantistojn subteni SAT, ĝis estos kreita pli taŭga por la komunistoj organizformo de internacia agado, samtempe senmaskante idealismajn falsideojn de SAT kaj trudante al ĝi pli da vera praktikeco, pli da komunista influo”.

Ne mirigas, ke Lanti fine de 1930 citis tiun frazon kiel fruan minacon de SEU pri skismo en la laborista Esperanto-movado.

Unu monaton poste la komunista frakcio de la CK de SEU distribuis en 3000 ekzempleroj alian, sespaĝan flugfolion ("Al la komunistoj - SAT-anoj"), kiu proponis, ke dum la sekvanta kongreso SAT decidu aliĝi al Komintern[19].

Reage je la du deklaroj Demidjuk verkis provon de malfermita letero al la CK, kiun li sendis al Lanti. Li memorigis, ke al la "anarkiaj elementoj" apartenas nunaj CK-anoj, kiuj en oktobro/novembro 1922 batalis kontraŭ la neŭtralismo, por la "revoluciigo" de SEU. La pretendon de SEU ne esti nacia organizaĵo li refutis per la atentigo, ke ĝi propagandas nur inter ruslingvanoj, kaj kontraŭ la akuzo, ke SAT havas idealisman komprenon de sennacieco, li defendis sin, citante la pledon de Nikolaj Buĥarin, ke unu el la plej gravaj taskoj de la proletaro estas "kulture refari sian naturon", kaj la vortojn de Lenin, ke la proletaro subtenas "ĉion venigantan al kunfandiĝo de nacioj".

Rilate la tezon, ke por la sovetia movado ne plu validas la kriterio de neŭtratismo, Demidjuk ripetis kategorie, ke SEU allasas por la edukado de la la-

19 La plena teksto de tiu deklaro bedaŭrinde ne estas je mia dispono, sed eltiraĵoj aperis en “Sennaciulo”, n-ro 322 (4-12-1930), p. 79.

boristaj amasoj "burĝe-neŭtratajn elementojn”. La proponon, ke SAT aliĝu al Komintern, Demidjuk ne prenis tre serioza: li trovis ĝin ne ellaborita kaj cetere —ankaŭ post la sperto pri ESKI— ne efektivigebla. Resume, Demidjuk defendis la unuecfrontan karakteron de SAT kaj admonis al SEU, ke, nomante anarkiistojn kaj socialistojn "pli danĝeraj malamikoj por la revolucia movado, ol la malkaŝa burĝaro", ĝi "atentu ĉe vojkurbiĝoj por estonte ne fari ankoraŭ iun pli ursan servon al Komintern, celanta krei la unikan fronton por kontraŭstarigi ĝin al la unua atako de l' kapitalo kontraŭ la laborista klaso”.

Demidjuk ne estis ŝancelebla en sia konvinko, ke la "ruĝiĝo de SEU estas ekstera nur, kaj interne ĝi restas same verda" (letero de 8-5-1923). Kontente li registris, ke la furiozaj atakoj de SEU kontraŭ la sennacieca ideo ne efikas kaj ke "fakte multaj provincaj komunistoj ĝin aprobas kaj aliĝas al SAT". Aliflanke, li nomis la rilaton de "La Nova Epoko" al SEU "plene lojala", menciante ankaŭ, ke Nekrasov tradukas tekstojn por urĝe bezonataj eldonaĵoj de SEU. Nur pri Drezen li restis malfida. Demidjuk skribis pri si, ke la soveta ŝtato venigis lin, "tiam knabon, en neŭtralisma tendaro al idearo revolucia", ke li pli kaj pli konvinkiĝas pri la praveco de la Partio kaj ke lin ĉiam pli logas verkoj de Lenin, fine kvazaŭ rekte alparolante Drezen:

”. . . mi kredas ke en momento de danĝero mi ĝisoste batalas por la revolucio kaj por la komunista partio, sed kune kun vi, pli ĝuste sub ambiciema gvidado, laŭ postuloj de via ambicio, mi neniam laboros, k-do Drezen”.

Ankaŭ Nekrasov denove esprimis sin pri Drezen tre malŝate. Studinte "tre atente la marksisman literaturon precipe pri la naciproblemo", li konkludis, ke Drezen kaj la aliaj, kiuj arogas al si paroli nome de la Partio, estas "absolutaj profanoj en la komunismo kaj marksismo". Li daŭrigis en sia letero de 5-6-1923:

”Se ni parolas pri Drezen, kiel tipo, li estas modela tipo de la t.n. "trokomisaruloj", kiuj ofte renkontiĝas inter la rusaj komunistoj kaj kiujn ordinare oni eksigas el la partio. Efektive, li ĝuste apartenas al tiu speco de personoj, kiuj ekokupinte altan oficpostenon ekkutimiĝas al la bongusto de l' ordonado... Unu ĉefan aferon Drezen kompreni ne povas, — ke la kultura organizaĵo ne estas komparinda kun policadministrejo ...”

Samtage Demidjuk skribis novan, 12 paĝan leteron al Lanti, grandparte responde al ties demandoj pri la situacio de SEU kaj ĝiaj rilatoj kun SAT. La letero ripetis diversajn karakterizojn pri Drezen kaj ankaŭ refoje substrekis la neceson batali "kontraŭ herezoj de Drezen" surbaze de bona scio pri la marksisma teorio.

Antaŭ la turnopunkto

Bedaŭrinde ne estas multe da fontoj pri la sinteno de Lanti en tiuj monatoj decidaj por la kunlaboro inter SAT kaj SEU. En la revuoj de SAT ne aperis publika reago je la du deklaroj de SEU, kaj ŝajnas, ke Demidjuk eĉ ne sendis sian malfermitan leteron al SEU. Por pravigi la pozicion de SAT kiel unuecfronta

organizaĵo estis graslitere presita en "Sennacieca Revuo" nur unu citaĵo de Grigorij Zinov'ev, la prezidanto de Komintern:

”Ni opinias, ke ĉiuj anarkistoj, ĉiuj sindikatistoj, kiuj sincere aprobas la klasbatalon, estas niaj fratoj”[20].

Ĝenerale, do, Lanti sintenis tre modere. Li povis tion fari parte pro tio, ke li rimarkis, ke Komintern komencis esti pli tolerema rilate la kunlaboron kun nekomunistaj laboristaj organizaĵoj.

Krome, laŭ lia vidpunkto estis grava faktoro, ke SEU en majo 1923 likvidis la reprezentiĝon de UEA sur sovetia teritorio. Pli frue, ĉiam estis onidiroj, transdonitaj ankaŭ de Demidjuk kaj Nekrasov, ke SEU deziras proksimiĝi al la "burĝa" UEA. Sed tiu decido indikis, ke SEU kunlaboros en internacia skalo vere nur kun SAT[21].

Por informiĝi pri la situacio de la sovetia movado kaj fari decidon pri la rilatoj kun SEU Lanti ne dependis nur de Demidjuk kaj Nekrasov. En Moskvo tiutempe vivis ankaŭ la franca SAT-ano Robert Guiheneuf, amiko de Lanti[22]. En letero de la 4a de julio [1923] li raportis al Lanti pri renkontiĝo kun Drezen; ties oficon li nomis "pli povenhava ol mi opiniis". Pri la "Novepokuloj", la kontraŭuloj de Drezen, Guiheneuf esprimis plenan simpation. Ili, laŭ li, kondukis pravan batalon defende al la principoj de SAT. Sed por daŭrigi tiun batalon necesas, skribis Guiheneuf, decidiĝi inter du solvoj: "Unue, per idea (tio estas per vere komunista) vojo. Due, per praktika vojo". Rilate la unuan eblecon, li komentis, ke ne eblas "venki nur per sincera defendo perparola (teoria)". Restas do nur la dua vojo, la "pli praktika, politika vojo". Aldoniĝas, ke la batalon kontraŭ Drezen efike povas konduki sole rusa komunisto en komunista medio, sed tia homo provizore ne ekzistas. Tion la "Novepokuloj" ne komprenis: ili "provis venki, per racia sincera publika diskuto... kaj falis". Nun ili estas izolitaj. Kaj Guiheneuf nomis la danĝeron, ke ili daŭrigos "sian kuraĝan sed ne fruktodonan vojon".

Jen senrevigaj, tamen kredindaj informoj. La posta letero de Guiheneuf al Lanti, ĉi-foje franclingva, alportis eĉ pli da klareco. La 21an de julio li raportis pri la ĵus finiĝinta Unua Kongreso de SEU, priskribante ĝian aspekton jene:

“40 personoj, amorfaj, aŭskultante komedion aranĝitan de Drezen, prezidanto. Ĉio funkcias glate, oni uzas, tra la tuta kongresado, la vortojn "komunisto", "proletaro", "revolucio". Sola D. parolas, aŭ liaj "ludiloj". Oni havas la impreson esti en armea sekcio, oni diras, ke oni devas fari tion, kaj oni faras tion. La voĉdonoj havas nenian valoron, kaj kredu, D. ne ĝeniĝas por tion diri al la kongresanoj. Li diras "ni komunistoj" anstataŭ "mi Drezen", kaj vi imagas la ceteron. Li uzas kaj uzos ĉiujn rimedojn por sukcesi, mensogojn, ŝtelojn, blufon, ĝentilecon, policon, perforton, komunismon, marksismon, kaj en iu venonta tago ordon kaj liberan penson nepre necesajn por vera socio civili-

20 “Sennacieca Revuo”, vol. 4, 1922/23, n-ro 7/8 (aprilo/majo 1923), p. 5.

21 Estis ankaŭ tiutempe, ke Komintern oficiale notis en protokolo, ke "neniu porlingva organizaĵo havas la rajton apogi sin" sur ĝian aŭtoritaton. Pri tio Nekrasov informis al Lanti per letero de 5-6-1923.

22 Pri Guiheneuf vidu Borsboom, “Vivo de Lanti”, p. 29, 65, 136.

zita (kapitalista)".

Hodiaŭ li tenas en siaj manoj ĉiujn esperantistojn de Ruslando, la kontraŭdirantoj (Nova epoko) estas absotute mutigitaj. Ĉi tie li estas nekontestebla mastro. Tio estas fakto".

Ankaŭ Giuheneuf esprimis sin konvinkita, ke Drezen celas organizi internacian esperantistan asocion kaj esti ĝia prezidanto. Li nur atendas la oportunan momenton; ĝis tiam li kunlaboros en SAT. Por malhelpi la planojn de Drezen, skribis Guiheneuf, necesas detronigi lin interne de SEU aŭ almenaŭ "neŭtraligi" lin. Tio okazu per lerta agado celanta samtempe la senkreditigon de Drezen ekster Soveta Unio kaj la firmigon de la ligoj inter la membroj de SEU kaj SAT. "En Cassel vi jam povos organizi tion".

Guiheneuf substrekis sian pledon por tiu strategio per interesa karakterizo de la "Novepokuloj":

"D. sukcesis kredigi, ke la N.E. estas grupo de 3 anarkiistoj (kaj ĉi tie tiu vorto signifas ĝisosta malamiko de la komunistoj). Mi devas konfesi, ke tio estas parte vera. Ili havas naturan liberecanan tendencon, sed ne speciale kontraŭ la komunistoj.

Futerfas, vera anarkiisto (kiel tiuj de Parizo), temperamento de polemikisto, de batalemulo; estas pli rekomendinde lukti kun li ol provi lin konvinki. Li povas sin kontraŭdiri plurajn fojojn en unu sama konversacio pro nura amo de la batalo, la lukto. Estas perfekta polemikisto kiu facile utiligas la sofismojn, kiu ne povas vidi tion, kio estas. Al li absolute mankas simpleco en la ideoj; al ĉiuj siaj ideoj li donas filozofian bazon...

Nekrasov estas poeto, ofte li estas en la luno, komplete disigita de la batalo, neniel farita por la batalo. Poeto.

Demidjuk, tre, tre bona kamarado, servema, ... sentoplena; farita por esti dronigata en la politikaj bataloj; malkapabla pri hipokriteco, kaj eble eĉ pri simpla manovro. Sed estas forto ĉar laborema, sindona kaj tre inteligenta. Lia sola malforto (se mi tiel povas diri) estas lia entuziasmo, lia granda fido.

Ĝenerale, koncerne al SAT, ili ĉiuj tri adoptis entuziasme religiece la ideon de "sennacieco", ili vivas el ĝi spirite, ili ĉerpis ĝin en ĝia tuto, ili reĵetis ĉiujn aliajn ideojn kaj volas vivi nur kun ĉi tiu. Ili estas apostoloj..."

Ni devas supozi, ke plej malfrue tiu letero konvinkis Lanti, ke, se li volas kreskigi la anaron de SAT en Soveta Unio kaj malhelpi eventualajn planojn de Drezen kapti la gvidadon de SAT, li ne plu povas dependigi sin nur de la simpatia triopo de "La Nova Epoko", sed devas serĉi komunan bazon kun Drezen. Lian juĝon influis ankaŭ letero, kiun al li skribis kun dato de la 26a de julio Hermann Konovalov el Niĵnij-Novgorod. Konovalov konfirmis, ke en la SEU-kongreso regis "blinda obeemo", sed li tamen konkludis, ke SEU tute konvenas al la kondiĉoj de Soveta Unio, kaj ke, se nun Drezen forirus, SEU kolapsus.

Demidjuk kaj Nekrasov ekaktivas en SEU

Ĉiuj flankoj febre atendis la Trian Kongreson de SAT, kiu estis kunvokita al Kassel (Germanio) por la tempo de la 11a ĝis 15a de aŭgusto 1923. Partoprenis ankaŭ Drezen kaj Nekrasov. La anoj de la Komunista Frakcio kolektiĝis en nepublikaj kunvenoj, kie okazis arda diskutado pri la proponoj de SEU, interalie tiu pri aliĝo al Komintern[23]. Lanti, tiutempe ankoraŭ membro de Franca Komunista partio, sukcesis faligi la proponojn. Li defendis la supertendencan karakteron de SAT kaj varbis por subteno de la komunistoj ankaŭ per la argumento, ke li bezonas ilin por sia batalo kontraŭ germanaj kaj aŭstraj socialdemokratoj, kiuj apartenis al la plej akraj oponantoj de la sennacieca ideo kaj organizformo. Fine Drezen cedis. En la publikaj laborkunsidoj ne plu sentiĝis malakordo, kaj en la Kongresa fermo Drezen eĉ deklaris:

"Tie-ĉi ni trovis tiun mezan vojon, kiun ni, revolucianoj, uzantaj por la profito de la proletaro la internacian lingvon, povas kune iri egale, ĉu anarkistoj, ĉu komunistoj, ĉu anoj de aliaj partioj revoluciaj. Ni kredas, ke ni trovis ĝustan kaj veran vojon"[24].

Al la mildiĝo de Drezen kontribuis la fakto, ke Lanti povis en Kassel trankvile paroli kun Nekrasov. En tiuj interparoloj, Lanti, sekvante la konsilojn de Guiheneuf, rekomendis al Nekrasov, ke li kaj Demidjuk ĉesigu sian opozicion kontraŭ Drezen kaj kunlaboru en SEU por tiamaniere bridi la ambicion de Drezen kaj venigi kiel eble plej multajn sovetiajn membrojn al SAT. Konforme kun tio, la kongreso decidis krei apartan literatur-sciencan aldonon al "Sennacieca Revuo", kiu prenu la lokon de "La Nova Epoko"; pri tia solvo, kiu celis eviti la sovetian cenzuron kaj presejan malfruon. Demidjuk kaj Lanti estis jam korespondintaj antaŭ la kongreso. Malaperis do, post sep kajeroj, la memstareco de "La Nova Epoko", sed la aldona kajero de "Sennacieca Revuo", kiu estis presita ekde oktobro 1923 en Leipzig, plue havis la redakcion en Moskvo[25].

Nelonge post la kongreso Demidjuk kaj Nekrasov efektive proponis sian kunlaboron en SEU. Ni ne scias, kiujn kondiĉojn ili metis, sed certe Drezen minimume promesis, ke ne estos malhelpoj al la varbado de novaj SAT-anoj en Soveta Unio. Demidjuk kaj Nekrasov transprenis la redakton de la Bulteno de SEU. Siavice, SEU ankoraŭ samjare konfesis, ke la propono ligi SAT al Komintern estis erara.

Kostoj de kompromiso

Sed ne tuj malaperis sekvoj de la eventoj, kiuj en la dua duono de 1922 kaŭzis tiom da ĉagreno al "La Nova Epoko". Fine de 1923 Demidjuk kaj Nekrasov spertis dumnoktan traserĉadon de siaj loĝejoj —sekve de informpeto de la Literatura Ĉefadministracio ĉe la sekreta polico, ĉu restas la suspekto pri anarkiismaj tendencoj de "La Nova Epoko". Demidjuk estis eĉ arestita.

23 Laŭ Borsboom, p. 42, Lanti mem proponis la starigon de Komunista Frakcio.

24 "Sennacieca Revuo", vol. 5, 1923/24, n-ro 1 (oktobro 1923), p. 11.

25 Malfermita letero ("Al la S.A.T.-anaro") informis pri la kuniĝo de "La Nova Epoko" kun "Sennacieca Revuo"; subskribis Nekrasov, Futerfas, Demidjuk kaj Hajdovskij. Vidu "Sennacieca Revuo", vol. 5, 1923/24, n-ro 1, p. 12.

"La reĝimo de politika malliberigito estis tute bona kaj donas multajn privilegiojn por maliberigito", –li poste (letero de 25-4-1924) raportis al Lanti. –"Sed la psika stato estis terura".

Dum la 19 tagoj de “izoligo” Demidjuk estis pridemandita ĉefe pri sia Esperanto-aktivado. Por lia liberigo dume klopodis ankaŭ Drezen, la sama, kies pli frua akuzo havis tian pluefikon.

Kiam Demidjuk, denove libera, tion raportis, nun Drezen troviĝis en malfacilaĵoj. En la kadro de partia purigo, eble rilatanta al la morto de Lenin (21-1-1924), li estis eksigita komence de 1924 el la Partio —oficiale pro sia antaŭa aparteno al la Partio de Soci-revoluciuloj, pro "filistra" vivmaniero kaj nepartopreno en la partia laboro. Drezen mem atribuis la eksigon al sia esperantisteco kaj al intrigoj de komunistaj idistoj. Post plendo al la tria instanco li fine estis reakceptita en la Partion.

Inter la pli ĝojigaj punktoj, kiujn povis noti Demidjuk en sia letero de 25-4-1924, estis ĝenerala vigliĝo de la sovetia Esperanto-movado: pli da kursoj, pli da artikoloj en la gazetaro, ankaŭ ”multaj represaĵoj el Sennacieca Revuo" kaj kresko de la nombro de SAT-anoj[26]. Pri SEU li informis, ke ĝi transiris al la principo de individua membreco, kiun rilate al SAT ĝi estis akre kritikinta ankoraŭ unu jaron antaŭe. Aparta signo de la atingita konkordo estis, ke en januaro 1924 "Sennacieca Revuo" komencis aperigi tradukon de tiu sama broŝuro de Drezen, kies recenzo fare de Futerfas siatempe estis kaŭzinta la konflikton.

Sed prezo, kiun devis pagi Demidjuk kaj Nekrasov, estis la perdo ĝuste de Futerfas. Li rifuzis partopreni la novan direkton kaj plue kontraŭis rilatojn kun SEU. Tial li eksiĝis el la redakcio de "La Nova Epoko". Fine de julio 1925, en la Dua Kongreso de SEU, Drezen etendis la manon al li; citante ankaŭ la nomon de Futerfas, Drezen esprimis la deziron, ke ĉiuj, kiuj "dume forestas de nia movado", aliĝu la vicojn de SEU[27]. Futerfas ne sekvis la inviton; li malaperis iam. Kiel diris Lanti kelkajn jarojn poste, li ne plu aŭdis ion pri Futerfas de post 1924[28].

Pri Hajdovskij, alia redakciano, kiu komence okupis mezan pozicion rilate kunlaboron en SEU, sed tiam pli kaj pli estis influata de Futerfas, Nekrasov sciigis al Lanti (letero de 9-5-1925), ke lin trafis la sama "izoligo" kiel pli frue Demidjuk. Pri tio Nekrasov esprimis bedaŭron, komentante, ke li "bone komprenas la belecon de a.ismo [anarkiismo] kaj absoluta sennacieco".

Sed li defendis sian propan, pragmatan starpunkton kaj eĉ formulis, ke la "leciono" donita al Hajdovskij estas necesa kaj espereble utila. La 1an de junio Demidjuk aldonis la informon, ke Hajdovskij "kun sia kunulino estas loĝigata

26 La nombro de sovetiaj SAT-anoj kreskis de 70 en 1923 al 278 en 1924.

27 “Soveta Esperantisto”, 1925, n-ro 9/10 (25/26), p. 37. - Sed malpli ol unu jaron poste Drezen avertis kontraŭ la restintaj "liberecanoj", kiuj provas "kompromiti la sovetlandan reĝimon antaŭ la laboristoj eksterlandaj"; li nomis ilin multe pli danĝeraj, ol la neŭtralistoj: "La vojoj de la movado mondlingva en Sovetlando", – "Meĵdunarodnyj jazyk", 1926, n-ro 15 (41), p. 4.

28 Laŭ Borsboom, p. 52, Futerfas estis deportita al Siberio kaj mortis tie en la 1930aj jaroj pro malsato.

en la stepojn de malproksima sudoriento" por tri jaroj. Ambaŭ, Nekrasov kaj Demidjuk, skribis, ke ili miras pri tio, ke tiel evoluis homo, kiu kune kun Drezen fondis ESKI kaj poste kune kun ili redaktis "La Nova Epoko". Kiel ili, ankaŭ Lanti ne defendis la pozicion de Hajdovskij, kvankam li esprimis pri la puno malaprobon[29]. En aŭgusto 1925 propono al la Kvina SAT-Kongreso en Vieno peti de la soveta registaro, ke ĝi liberigu Hajdovskij, estis malakceptita pro tio, ke "ni ne konas la aferon" kaj "do ne povas enmiksiĝi"[30].

Konkludo

En SAT, kiu la postan jaron [1926] kongresis en Leningrad, nun regis la devizo "unueco super ĉio". Neniu flanko deziris malfirmigi la pene starigitan kunlaboron inter SAT kaj SEU, kiu fakte komencis rapide montri sukcesojn. Jam la 9an de majo 1925 Nekrasov fiere sciigis al Lanti, ke "la ŝanĝo de nia taktiko donis belajn fruktojn": "Nia ĝenerala movado estas nekompareble kreskinta". Kaj: "SEU estas firme gvidata kiel prepara ŝtupo al SAT". Komenciĝis kelkjara periodo, dum kiu de la kunlaboro profitis ambaŭ flankoj. Demidjuk kaj Nekrasov plenforte disponigis sin al SEU, kaj Drezen agnoskis la gvidan rolon de Lanti en SAT. Sovetiaj esperantistoj entuziasme uzis la servojn de SAT, kaj la asocio siavice multe riĉiĝis per la intelekta kontribuo de siaj membroj en Soveta Unio. Ne ŝajnis prudente endanĝerigi tiun reciproke utilan kunlaboron per troa zorgemo pri malplimulto.

Venkis do realismo kontraŭ la iluzio, ke Esperanto kvazaŭ per si mem disvastiĝos en la nova epoko de revolucio. Tion plej frue komprenis Drezen, sed unue Lanti kaj poste Demidjuk kaj Nekrasov sekvis lian ekzemplon.

Ne estas eble tie ĉi klopodi pri justa takso de la kontraŭdira personeco de Drezen. Ni nur konstatu, ke li en la uzitaj fontoj aperas kiel esperantisto, kiu ne estis malpli fervora ol liaj antagonistoj, kiuj tamen pli rapide ekkonsciis, ke post revolucio unue necesas zorgi pri la plej urĝaj ĉiutagaj taskoj, kaj tiuj estis koncerne Esperanton: organizi la movadon, starigi kursojn, varbi membrojn. Por atingi tion ne utilis revolucia retoriko, sed unuavice gravis persista, planita laboro.

Drezen frue adaptis sin al la eksteraj cirkonstancoj, al la kondiĉoj regantaj post la enkonduko de NEP en Ruslando. Lia kompromisemo, pro kiu ĝis 1922-1923 kaj denove post la skismo li estis atakata kiel oportunisto kaj kaŝa neŭtralisto, tute konformiĝis al la kvalitoj, kiujn bezonis gvidanto en la juna soveta ŝtato. Kaj li sukcesis: Drezen kreis faktojn, al kiuj Demidjuk kaj Nekrasov devis cedi. Lanti kaj liaj intimaj amikoj-disĉiploj fine komprenis, ke ankaŭ ili ne povas ignori la eksterajn cirkonstancojn kaj ke se ili volas antaŭenigi SAT kaj, kompreneble, konservi ĝiajn gvidprincipojn, kompromisoj ne estas eviteblaj —ke ne sufiĉas pasie deklari senkompatan batalon kontraŭ la neŭtra-

29 Letero de Lanti al Demidjuk kaj Nekrasov de 23-6-1925. Tiu ĉi letero estas parte presita en "Leteroj de Lanti", Paris, 1940, p. 79-83, sed kun erara noto de la kompilinto, ke temas pri A. Levandovskij (alia anarkiisto, ankaŭ ekzilita tiutempe).

30 “Sennaciulo”, n-ro 51 (17-9-1925), p. 3.

listoj. Ili decidiĝis por la unueco de la tutmonda laborista Esperanto-movado, vole-nevole akceptante ne nur la potencon de faktoj, sed ankaŭ la forpuŝon de malplimulto el la propraj vicoj.

Pli malfrue, Lanti bedaŭris kelkajn sekvojn de sia cedemo. Sed nia priskribo kaj provo de juĝo devas finiĝi tie ĉi. Estas ekster la celo de tiu ĉi artikolo doni superrigardon pri la posta evoluo de la rilatoj inter SAT kaj SEU. Ni ankaŭ ne traktos la skismon, kiu definitive apartigis Lanti disde Demidjuk kaj Nekrasov, nek la pereon de SEU, al kies viktimoj apartenis Drezen kune kun Demidjuk kaj Nekrasov. Sufiĉu la atentigo, ke la eksteraj cirkonstancoj ne plu permesis konservon de la kunlaboro inter SAT kaj la sovetia Esperanto-movado[31]. Sed kvankan la politika fono poste iĝis tia, ke detruiĝis ĉio atingita en 1923, ni tamen vidas nin rajtigitaj al la konkludo, ke la diversaj agantoj, kies penan vojon al kunlaboro ni observis, ne faris siatempe malĝustan decidon.

***Sennacieca Revuo* 1987(115)35-52**

31 Por detaloj vidu la ĉi-jare aperontan novan eldonon de la "Danĝera lingvo".